

TEA-BULTENO

6^A JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2003

NUMEROJ 9-10

UK en Gotenburgo!

Raporto de Elda Doerfler

Jaro 2003 - 88^a UK en Svedio. La ĵus alteriĝintajn italojn bonvenigas 20-grada temperaturo: ho, finfine iom da freŝa aero! Sur ambaŭ flankoj de vojo direktanta al Gotenburgo densaj arbaroj sugestas ripozon kaj plenpulman enspiradon de pura aero. Smeralda verdo tapiŝas larĝajn zonojn eĉ en la urba centro, ĉirkaŭas nin riveraj, lagaj kaj maraj akvoj, eĉ el la ĉielo ĝi superverŝas nin! Tre refreŝiga akcepto por ni venintaj el sudaj landoj, kie jam de monatoj oni sopiras je iom da pluvo kaj kie tropika varmo ne plu elteneblas.

Komenco bona promesas daŭrigon eĉ pli bonan! Kaj fakte tiel estis! La tuta kongreso disvolviĝis enorde, akurate kaj perfekte, laŭ miaj vidpunkto kaj antaŭaj spertoj. Jam sabaton la 26^{am} de julio ni trovis preta la Kongresan Kurieron, ĉefredaktitan de nia bone konata amiko Franko Luin. En la Kuriero, verkita laŭ la kutimaj stilo kaj celo de korekta kaj rapida informado, eblis trovi ĉiujn bezonatajn informojn pri programoj, interesajn artikolojn kaj raportojn pri okazintaj kunvenoj ktp.

La Kongreson partoprenis 1791 homoj el 63 landoj, sed ĉiu ret-havanto, lokita ie ajn tra la mondo, fariĝis virtuala kongresano, ĉar eblis sekvi la laborojn tagon post tago, horon post horo, per simpla interreta kunligo ĉe la adreso www.uk-2003.net. Tiu ttt-ejo funkciis ankaŭ kiel retroŝta kesto por rapide kontakti la kongresanojn: al ĉiu el ili estis asignita adreso, laŭ la kongresa numero, kaj la mesaĝo ricevita estis je dispono de la adresito ĉe la Mesaĝotabulo. Tiu ĉi unu el la novaĵoj, unuafoje enkondukita en ĉijara kongreso!

Granda estis la interesiĝo de la amaskomunikiloj kaj lokaj kaj naciaj kaj alilandaj. Radioj kaj televido ofte dissendis intervjuojn kun kongresanoj. Sekvis la kongreson ĵurnalistaj teamoj el Francio, el Usono (magazino *Newsweek*), el Kroatio, ka.

Kiel kutime, abundis la programo je eroj tre interesaj kaj sendube ĉeestindaj: tre malfacilis la elekto inter la pluraj okazintaj samtempe! Ĉi-jare estis tre signifa ŝanĝo en la tradicia kongresa programo, nome la inaŭguro okazis lunde anstataŭ dimanĉe! Bonege: ĉiu el ni ekde tuj mergiĝis en la laboroj!

El la programo:

Landa agado: Modeloj kaj ekzemploj

Kvar asocioj, pere de siaj reprezentantoj, prezentis siajn spertojn, sukcesojn kaj defiojn en la propraj landoj. La prezidanto de Litova E-Asocio Povilas Jegorovas (kiu i.a. varme invitis al partopreno de UK en jaro 2005^a en Vilnius) priskribis la sukcesojn akiritajn en instrua kaj eldona sektoroj; la prezidanto de Unuiĝo Franca por E-

speranto raportis pri la aktivado en politika kampo, celanta altiri la atenton de ŝtataj instancoj kaj eŭroparlamentanoj. Japana Esperanto-Instituto prezentis la profesiecan disvolviĝon de sia aktiveco en kampoj instrua, eldona kaj propaganda, favorata en tio de la posedo de 4-etaĝa domo, dum Maritza Gutierrez, prezidantino de Kuba Esperanto-Asocio, asertis ke, malgraŭ la konstante premaj problemoj de viveltenado, daŭras kaj eĉ pli revigliĝas la agado de kuba esperantistaro favore al disvastigo de nia lingvo.

Afrika Agado

Gravas la novaĵo ke estis ĵus kreita fondaĵo "Hans" (memore de Hans ten Hagen) kies granda kapitalo financos la edukadon de instruistoj en Afriko, por ke ili iĝu kvalitaj kaj memstaraj.

Seminario pri Interlingvistiko

"Ĉu Esperanto havas konkurencon? Rigardo en aktualan planlingvan mondon". Per tiu ĉi temo la konata fakulo d-ro Detlev Blanke donis enkondukon al la studado de planlingvoj. El ĉirkaŭ 1000 planlingvaj sistemoj, krom Esperanto, nur malmultaj eniris praktikon. Kaj la projekto kvanto daŭre kreskas. Dum la seminario estis pritraktitaj la diversaj motivoj de kreado de planlingvoj aŭ planlingvoprojektoj, estis klarigita la distingo inter projekto kaj lingvo kaj skizita la aktuala situacio de aliaj lingvoj kiaj Volapuko, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua kaj Glosa, kaj aliaj.

Literaturo en Esperanto, en Esperanton kaj el Esperanto

D-ro Humphrey Tonkin, kiu tradukis en kaj el Esperanto, Anna Löwenstein kies romano *La Ŝtona Urbo* estis verkita en la angla kaj tradukita de la aŭtoro mem en Esperanton, Spomenka Ŝtimec, kies lasta libro *Tilla* vere elstaras inter ĉiuj ŝiaj, kaj la ĉeesto de la nepo de nia Majstro Ludoviko Zaleski-Zamenhof igis eksterordinara kaj neforgesebla la kunvenon, dum kiu estis vaste diskutataj la problemoj de traduk-arto, kaj de verkado en Esperanto.

Esperantologia Konferenco

Okazinta dum du diversaj tagoj pro la amplekso de la diskuttemo, sub prezido de nelacigebla d-ro Humphrey Tonkin. Ege atentokapta la argumentado de la prelegantoj: Unue parolis Ziko Sikosek pri historio kaj nuna stato de Biblioteko Hodler ĉe UEA kaj pri prioritatoj de Esperanto-Bibliotekoj ĝenerale – aldonis siajn komentojn d-ro Ulrich Lins, konata historiisto. Due denove la lingvisto Detlev Blanke argumentis pri la vojoj al faka literaturo pri esperantologio kaj interlingvistiko. Eldiris sian opinion prof-ro Probal Daŝkupto (kies eleganta kaj modele flua elparolo fascinis la ĉeestintojn!).

Filatelero Sabaton la 2^{an} de aŭgusto ĉiuj korespondaĵoj estis stampitaj per la prikon-gresa stampo. La vortoj "Universala Kongreso de Esperanto" aspektas kiel ondaro – kio fakte reprezentas la iradon de nia movado – foje ĝi atingas la pinton, foje la profundon, por poste denove alten

leviĝi kaj... Tia ja estas nia realo!

Pri dekoj da aliaj kunvenoj/prelegoj indus plue paroli, sed ne facilas per mallongaj frazoj ĉion prezenti aŭ detaligi, tial mi preferas fini per la kortuŝa malferma parolado de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, en kies kerna signifo certe ni retrovas niajn plej intimajn (kaj ofte kaŝitajn) sentojn al nia amata lingvo.

Estimata Sinjoro Prezidanto,

Estimataj Gesinjoroj Honoraj Gastoj,

Estimataj Gekongresanoj!

Mi salutas vin, karaj Geamikoj, karaj Gefamilianoj de la granda Zamenhofa Rondo Familia, alvenintaj al Gotenburgo por kongresi kaj debati pri la lingvaj rajtoj, grava kaj defendinda elemento de la homaj rajtoj ĝenerale. Okazis, ke antaŭ sesdeko da jaroj la nomo de, tiam de mi ne konata, urbo Gotenburgo aperis al mi, al mia familio, ĝuste kiel sinonimo de tiuj homaj rajtoj, kiel sinonimo de libereco. Al ni, en Varsovio tiam sub okupacio, al ni enkarcerigitaj antaŭ la fi-famaj muroj, Gotenburgo egalas mondon fabelan, mondon el kiu, same kiel manao de ĉielo en tempoj bibliaj, alvenadis diversaj bongustaj manĝaĵoj kies ekzisto estis ĉe ni, tiutempe, jam de longe forgesita. Mi ĉiam memoros la nomon de la sendinto aperinta sur la pakajoj: la nomon de Einar Adamsson, gotenburgano kaj esperantisto. Mi havis la ŝancon, kelkajn jarojn pli malfrue, konatiĝi persone kun la karmemora Homo, okaze de la kongreso en Malmö, la sola kiun mi sukcesis partopreni dum postmilita jardeko. Tiam mi konatiĝis ankaŭ kun la urbo Gotenburgo, kaj amikiĝis kun la tuta familio Adamsson; cetere la filino de Einar daŭre estas amikino tre kara.

Pardonu, Geamikoj, la karakteron eble tro personan de ĉi tiu mesaĝo kiun mi volis esti oficiala. Ĝin konkludante, mi ŝatus deziri plenan sukceson al la 88^a Universala Kongreso nun komencanta. Mi esperas, ke la rezultoj de niaj debatoj, saĝe kaj lerte de Prof-ro Humphrey Tonkin gvidataj, grave kontribuos plifortigi lingvaj rajtojn, sekve la rajton al propra kultura identeco de ĉiuj komunumoj sur nia terĝlobo; rajton kies protekton celas ja nia neŭtrala lingvo Esperanto. Rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la Zamenhof-straton kondukantan al harmonia interkompreno de popoloj, kies plenrajta originlingva diverseco ne plu kaŭzu malamon reciprokan, sed estiĝu plej valora kultura riĉeco.

Enkadre de nia Universala Esperanto-Asocio ni daŭre laboru kaj batalu por la lingvaj rajtoj, sed ankaŭ, same kiel antaŭ sesdek jaroj, por la homaj rajtoj ĝenerale kaj tute specife por la rajto nenie malsati sur nia terĝlobo. Ni kontribuu al la monda etoso de solidareco, ni apogu tiukampan agadon de UNESKO kaj de la UNUĜINTAJ NACIOJ, surbaze de niaj kun ili rilatoj, kiuj estu ne nur oficialaj, sed ankaŭ efikaj kaj konsiderintaj.

En la merkreda suplemento TUTTOSCIENZE de la Torina tagjurnalo LA STAMPA (16/07/2003), aperis interesa artikolo el la plumo de **Renato Corsetti** (Universitato LA SAPIENZA Romo) pri diskutiga temo

LA REVO PRI NOVA ESPERANTO

Oni ree ekzamenas la debatatan realon de la lingvaj universalecoj. Starpunkto: la specifaj cerbaj funkcioj ĉe la areo de Broca.

La gazetaro raportis pri la psikolingvistikaj esploroj faritaj ĉe SAN RAFFAELE en Milano kunlabore kun la Universitato de Hamburgo, el kio rezultus, ke la gramatikaj reguloj originas el la cerba areo de Broca. Ĉio ĉi pravigas Chomsky-n, opiniantan, ke la homa lingvaĵo estas kunnaskita kaj ke ekzistas universala gramatiko de la lingvoj. La revo de Andrea Moro, unu el la ĉefesploristoj, estus realigi novan esperanton.

La eksperimento de Moro ĉe la Universitato VIVO KAJ SANO de SAN RAFFAELE, Maria Cristina Musso kaj du kolegoj de la Universitato en Hamburgo, Cornelius Weiller kaj Christian Buchel, vere gravas kaj tute aktualas, ĉar ĝi enŝoviĝas en la fluon de eksperimentoj plenumataj per magneta resonanco, kiu ebligas malfermi fenestron sur la "mekanika" funkciado de la menso, kaj plie ĝi enŝoviĝas en la vastan debaton pri la realeco aŭ malrealeco de la hipotezoj pri Universala Gramatiko kaj ĝia alireblo por lernanto de dua lingvo.

La fakto ke pri la fascinaj Chomsky-aj teorioj eĉ nun sin okupadas la esplorantoj atestas la intereson trovi simplajn klarigojn, iamaniere "religiajn", por kompleksaj fenomenoj.

Do, Piattelli Palmarini, kiu praktike estis invitita de Moro, tuj kaptas la ŝancon revigligi la plenan fluon de la Chomsky-aj hipotezoj, kiuj iam vere trovis malmultajn empiriajn konfirmojn fare de la psikolingvistika esploro.

Sed ni revenu al starpunkto: lerni fremdajn lingvojn estus tute afero de instinkto kaj ekzistus zono en nia cerbo, estranta la lernadon de lingvoj.

La dua aserto ŝajnas al mi ne pridiskutata. La ekzisto de la areo de Broca kaj ties funkcioj estas faktoj delonge pruvitaj. Ĉiam, kiam temas pri gramatikaj reguloj, ekfunkcias tiu areo. Ĉi tion bone sciis Broca jam dum la dekaŭa jarcento.

Male, ŝajnas al mi diskutebla la unua aserto kaj ĝia korolaro: ekzistas universalaj reguloj por la lingvaĵo kaj nur respektante tiujn, oni aktivigas la cerban areon de la reguloj, do, oni lernas lingvon. Por komenci, la tuta esploro pri la lingvistikaj universalecoj eĉ nun ne kondukis al malmultaj bazaj gramatikaj reguloj nerefuteblaj kaj konstateblaj en ĉiuj lingvoj, escepte de ĝeneraligoj vere tro ĝeneralaj.

Iuj el tiuj "reguloj", cititaj de Moro kaj Piattelli Palmarini, ŝajnas cititaj ĝuste por esti kontraŭdiritaj. Ni memoru nur la principon – laŭ la artikolisto atribuebla al Moro kaj inter citiloj menciita – pri la ekzisto de "subjekto, verbo, la kongruenco de la artikoloj". Sufiĉas esti studinta vicon de lingvoj aziaj aŭ amerikindianaj por trovi malfacilan distingon inter subjektoj kaj verboj. La neekzisto de la kongruenco de la artikoloj troveblas eĉ tre pli proksime.

Piattelli Palmarini mencias la "absurdan" regulon, laŭ la esploro, pri la trialoka situo de la nea vorto. Sed ĉu ne estas samgrade absurda la regulo de la dualoka

verbo kutime uzata en la germana lingvo?

La fakto ke la revo de Moro estas kreo de iu nova esperanto, ne plu surtable kreita sed subtenata de fortika scienca framo kaj tre utila por la Interreto, klare evidentigas la miskomprenojn pri esperanto. La lingvo esperanto estis ĝuste kreita ĉetabile, sed en plena respekto de la gramatikaj reguloj komunaj al multaj lingvoj hindeŭropaj kaj ne hindeŭropaj. Pruvas la "naturecon" de esperanto la fakto, ke dum jarcento ĝi fariĝis lingvo "tute nature" lernata kaj parolata en la tuta mondo.

Temas pri io tre malsama kompare kun la lingvaĵoj de programado, pri kio eble oni pensas aludante interreton.

Veras ke esperanto, kun facilaj kaj senesceptaj reguloj, estas rapide lernata, multe pli rapide ol aliaj lingvoj naturaj. Tio eblas – ĝuste laŭ la rezultoj de tiu ĉi eksperimento – pro la senobstakla funkciado de la areo de Broca, alivorte pro la homa kapablo interrilatigi faktojn kaj eltiri regulojn, kaj ilin apliki al nova materialo: ĉion ĉi regula lingvo kia esperanto pli valorigas.

Ĉiuj kiuj intencis interesiĝi pri tiu temo kaj eksperimenti – ekde la usona pedagogisto Thorndike komence de la pasinta jarcento – tion ekrimarkis kaj pritraktis.

Krome la kutimo rezonadi pri lingvoj pliiĝas la metalingvistikajn kapablojn de la lernantoj de esperanto kaj poste de aliaj lingvoj. Tion evidentigis laste la germana Universitato de Paderborn dum la sepdekaj jaroj. Sed ankaŭ por tio ne estas supozenda kunnaskita fakto. Sufiĉas apliki la kutiman homan kapablon por solvi problemojn.

(Trad. de G.Valente)

Mallonge pri...

MONATO serĉas kunlaborantojn! La eldonejo de la internacia magazino, MONATO komunikas, ke vakas la postenoj de redaktoro pri scienco kaj de redaktoro pri medio. La kandidatoj tre bone regu Esperanton, havu fortan interesiĝon pri la fako scienco aŭ medio, kaj disponu pri retaliro. Al la redaktoroj MONATO pagas modestan honorarion. Kiu interesiĝas pri la posteno skribu al: MONATO; Rete: monato@fel.esperanto.be Pliaj informoj pri MONATO troviĝas ĉe: <http://monato.esperanto.be>

Litovia ĉefurbo vokas Esperante! La retpaĝaro de Vilnius, la ĉefurbo de Litovio, informas pri si ankaŭ en Esperanto. Inter pluraj lingvoj sur la komencopaĝo estas elektebla ankaŭ la internacia lingvo.

Promenu en Vilnius rigardante la paĝaron ĉe:
<http://www.turizmas.vilnius.lt/>

Tri filmoj pri Litovio en Esperanto Prepare al la 90^a Universala Kongreso en 2005, aperis jam tri filmoj pri la lando, kun la celo veki interesiĝon inter la eksterlandaj esperantistoj pri la kongres-gastigonto.

Jen la titoloj de la filmoj:

1. Baltmara sukceso
2. Kaunas, urbo ĉe riverkunfluo
3. Litova kalendaro: festoj, moroj, tradicioj

Eblas ilin ricevi de Litova Esperanto-Asocio.

Esperanto estas akceptita de la Universitato Wonkwang en Koreio En Koreio, ĝis nun, nur en la Universitato de Dankook Esperanto estas instruata oficiale kiel lerno-objekto kun poentaro. Ekde la 23^a de junio, la sama estas ankaŭ en Wonkwang. La lecionoj komenciĝos

en la septembra semestro gvide de Docento LEE Jung-kee. Kompreneble bonvenas gratulmesaĝoj el ĉiel! La retadreso estas: esperant@unitel.co.kr

Komputada leksikono senpage! Oni povas peti Komputadan leksikonon senpage de Ruben Feldman Gonzalez. La vortaro estas 78-paĝa, en komputila formato ĝi estas 1132 kilobajtoj granda. Oni povas peti ĝin de: Ruben Feldman Gonzalez Rete: rufegonz@mx1.cablemas.com

Ĉu Olimpia Sportejo ESPERANTO en Rio? TIO DEPENDOS NUR DE VI!!! Pasintmonate samideanino Zilda Ferreira el Rio de Janeiro, sukcesis transdoni al la urbestro de ties urbo, s-ro Cesar Maia, leteron, per kiu ŝi proponas ke la konstruota Olimpia Sportejo en kvartalo "Engenho de Dentro" en Rio ricevu la nomon ESPERANTO. En 2007 Rio sidejos la TutAmerikajn Olimpiajn Ludojn. Krome la urbo kandidatiĝas por akcepti la Mondajn Olimpiajn Ludojn en 2012. Se vi apogas la proponon de s-ino Zilda, bonvolu retmesaĝi al Cesar Maia, preferinde en la portugala, hispana, angla, itala, franca aŭ Esperanto: cesarmaia.iplan@pcrj.rj.gov.br

Informis Aloisio Sartorato ludoviko44@yahoo.com.br

Ekspozicio en Mantova Esperantistoj en urbo Mantova (Italio) planas aranĝi ekspozicion okaze de grava, nacia, literatura evento inter la 4^a kaj 7^a de septembro ĉj. Ili bezonas afiŝojn pri Esperanto aŭ pri Esperanto-aranĝoj, desegnaĵojn, bildkartojn, salutmesaĝojn, poeziaĵojn, ktp. Sendantoj kontaktu esperantistojn rete ĉe: graziano.ricagno@libero.it

Karnavalaj naciaj vestoj el la tuta mondo estas atendataj en formo de foto aŭ bildkarto por organizi letervesperon decembre 2003 en Kostroma, Rusio. Kontribuoj estas atendataj ĉe: Jelena Serova, str. Ivana Susanina, 5-4/17-79, RU-156005, Kostroma, Rusio

Nova Esperanto-strato en Belgio La 10^{an} de julio la nova Esperantolaan estis malfermita al la trafiko ĉe la limo de la urbo Oostende. Ĝi ligas la Brugsesteenweg (N9) al la kanalo "Gent-Oostende", kaj kondukas al Oudenburg. Tiu kvartalo estas nova industria-sciencia areo kie universitataj kaj teknikaj entreprenoj lokiĝos. En Oostende ekzistas jam tri ZEO-j.

Successo di DISVASTIGO, l'agenzia esperantista

sui problemi della comunicazione

Per interessamento di DISVASTIGO, nel numero di luglio della più diffusa rivista di informatica, IL MIO COMPUTER, c'era allegato un CD-Rom contenente anche un corso di esperanto in 12 lezioni, con pronuncia, esercizi e canzoni in MP3.

Con questa nuova uscita de IL MIO COMPUTER (tiratura media di circa 140.000 copie), che già l'anno scorso aveva pubblicato una precedente edizione del medesimo Corso, si avrà una nuova ondata di richieste di tutori per la correzione degli esercizi, soprattutto da parte di giovani e giovanissimi, desiderosi di apprendere la lingua internazionale.

Il corso è stato creato da Carlos Pereira che si è valso della collaborazione di Edvige Ackermann, agente generale di DISVASTIGO per il Friuli Venezia Giulia, che per l'occasione ha mobilitato tutta la famiglia per la registrazione dei vari dialoghi.

Esperantio: Lanĉita subportalo pri komerco
Kun granda honoro ni invitas vin viziti la ĵus lanĉitan portalon pri negocoj de Ĝangalo: la Virtuala Komerca Ĉambro Esperantista. En ĝi vi trovos ne nur reklamojn pri varoj kaj servoj, sed ankaŭ interesajn tekstojn, intervjuojn kaj informojn pri ekonomio kaj komerco en Esperanto.

La celo de ĉi tiu portalo estas antaŭenirigi la uzon de la internacia lingvo en la komercaj rilatoj inter la esperantistoj kaj ekster la komunumo, malfermante al Esperanto tutan novan mondon da oportunoj kaj eblecoj. Ni kalkulas je la entreprenemaj esperantistoj, ke ili estos konstantaj vizitantoj, sugestante al tiuj registri sian entreprenon ĉe nia subportalo, ĉar kun la giganta vizitnombro de Ĝangalo (4^a plej vizitata paĝo en la lingvo Esperanto, kun pli ol 75.000 vizitantoj nur en la unua semestro 2003), la varo aŭ servo estos diskonata kaj reklamita multe pli efike. Se oni deziras dungi, staĝi aŭ volontuli, tiuj povas lasi anoncon en la speciala sekcio "Dunganoncoj". Tralegu la informojn en la portalo. Nova erao por komerco per Esperanto startis hodiaŭ... kaj ni volas la partoprenon de ĉiuj entreprenistoj esperantistaj en tiu revolucia procezo.

El tt-ejo ĝangalo.com



Esperanto-muziko elŝutebla!

Danke al ĝentileco de BANDO MERLIN, el Brazilo, estas disponeblaj por elŝutado kvin muzikoj en la retpaĝaro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. La muzikoj estas: Ho! Mia kor!; Verda Soldato; Aferoj por Gardi; Estis Unu Fojo; Mia Vojo. Vi devas aliri al la paĝo de KKE ĉe: www.kke.org.br kaj klaki sur la Esperanta versio. Poste klaku denove sur la alternativo "Muzikaro".

Eblas elŝuti per la sama proceduro, ankaŭ du kanzonojn de la GRUPO KAJTO: Temas pri la muzikoj "Dormu Milde" kaj "Masko".

Informis Aloisio Sartorato Rete: ludoviko44@yahoo.com.br

Bona rezulto per bonkoro kaj Esperanto

La junulara Esperanto-klubo TEAMO en Ivanovo (Rusio) iniciatis kolekton de libroj por infanaj internulejoj de sia urbo kaj nomis sian agon BONKORA LIBRO.

La ideo venis, kiam la urba registaro invitis ĉiujn junularajn klubojn partopreni en la PRINTEMA SEMAJNO DE BONKORO, t.e. semajno de volontula servado. La esperantistoj, memorante ke la plej granda parto de infanaj internulejoj en Ivanovo havas malriĉajn bibliotekojn, decidis helpi tiucele, envolvante en sia agado gazetaron, urbajn universitatojn kaj lernejojn, librovendejojn ks.

Fine la rikolto estis tre riĉa: dum du semajnoj estis kolektitaj 1500 libroj. Ilin ricevis bibliotekoj de tri internulejoj. Danke al sponsoroj, la infanoj festis la ricevadon de libroj per limonado kaj dolĉaĵoj.

La Klubo TEAMO donacis al ĉiu biblioteko lernolibron de Esperanto kaj deziris al infanoj trovi amikojn tra tuta mondo.

Metzger kaj Schleyer beatigotaj

En junio 2001 pastro Bernhard Eichkorn proponis al la arkiepiskopo de Freiburg (Germanio) la beatigon de du pastroj de lia diocezo: D-ro Max Josef Metzger (1887-1944) kaj Prelato Johann Martin Schleyer (1831-

1912). La unua, aktiva esperantisto, pacifisto kaj pioniro de la ekumena movado, mortis kiel martiro, ekzekutita de la nazioj. La dua estas konata kiel aŭtoro de la planlingvo Volapük (1879/80), sed ankaŭ kiel religia verkisto, redaktoro (Sionsharfe - Ciona Harpo, 1876-1884) kaj filantropo. Li estas rigardata kiel patrono de interpopola interkompreniĝo.

Raportis: Internacia Komitato por la Beatigo de Prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912)

SchleyerKomitee@aol.com

Renkontiĝo en Valtellina

La rendevuo por la tradicia kunveno en Valtellina estas fiksita por dimanĉo la 19^a de oktobro. Ĉifoje ni vizitos la naskiĝurbon de "pizzoccheri", la historian vilaĝon Teglio. Same tradicie, la organizanto estas Gaspere Bracchi kaj familio, kiu atendas vin multenombraj: por pliaj informoj, kontaktu lin. Vi ja povas ankaŭ ret-poŝti al: ermigi@infinito.it Bonan amuziĝon!


PROGRAMO EN TEA

Antaŭ ol komenci plenaktive la kluban vivon kaj la por-esperantan agadon, ni renkontiĝu por kune skizi la estontajn programojn.

Ĉiu el vi estas varme invitata kunveni **vendredon**

la 12^{an} de septembro, je la 20^a horo, ĉe TEA:

bonvolu kunporti ideojn, dezirojn, proponojn kaj sugestojn, kaj ĉefe laboremon! Ni atendas vin multnombraj! Jam programita la aktivado dum mardoj: ni kune esploru la arkivejojn kaj hemerrotekon, por ĉerpi informojn cele al preparo de libreto pri Historio de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, eldonenda okaze de ties 100-jariĝo en aprilo 2006. La sidejo estos malfermita ekde la 2^a de septembro, ĉiujn mardon kaj vendredon, je la 19.30 horo.



Dimanĉon

la 14^{an} de septembro

Festo de Amikeco

ĉe Dreiländerecke

Ĉu vi pretas surgrimpigi monton? Ĉu vi pretas ĝui amikecan etoson kune kun kelkmilo da alilandanoj? Ĉu vi pretas gustumi aŭstrajn, italajn aŭ slovenajn frandaĵojn, komforte sidantaj tere, sur tapiŝo de verda herbo? Se jes, ni atendas vin multnombraj sur la pinto de *Monte Forno!*

Triesta esperantistaro estas varme invitata anonci sin por interkonsenti pri kunvojaĝo ĉe TEA-sekretario; telefono: 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00) aŭ rete: testudo@adriacom.it.

Ne forgesu surmeti vian Alp-Adrian T-ĉemizon kaj -ĉefe - komfortajn ŝuojn!

En Gotenburgo: Kal piediras kaj trenas sian biciklon en la tramtrako. La tramisto signalas re- kaj refoje, sed Kal ne flankeniras.

—Ĉu vi ne povas moviĝi for de la trakoj?

—Kompreneble, mi povas, respondas Kal fierace. —Sed vi ne povas!

Informoj ĉerpitaj el: KONGRESA KURIERO, RET-INFO kaj NUN

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it

http://arte.triesteincontra.it/esperanto

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
 Poŝtĉekkonto N° 10834349